Sennaciulo


Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Februaro 2002 — 73-a jaro, n-ro 2 (1160)

ISSN 1163.0442 — MENSUEL/MONATA

Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

http://www.sat-esperanto.org/ * retadreso: satesper@noos.fr**



Adiaŭ kamarado IVO

Grava komuniko, paĝo 18

Fotis k-do Mikaelo SCHERM,dum la kongreso en Karlovy Vary

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...



*Karaj gekamaradoj,
tiu ĉi numero de Sennaciulo estas redaktita sub peza premo ke bona kamarado kaj amiko por ĉiam forlasis nin. En la januara S-ulo (kiu cetere malfruis) ni povis nur informi vin pri tiu bato kiu trafis nian Asocion. Duono de tiu ĉi numero estas dediĉita al k-do Peyraut. Pro tio mankas en ĝi kelkaj kutimaj rubrikoj, kiujn vi retrovos en marto.
Mi atentigas ĉiujn bone legi la apudan komunikon kaj agi konsekvence. Krom tio pensu pri kotizoj. Ĉiujare estas pluraj malnovaj membroj kiuj forgesas pagi la kotizon kaj poste ni devas rememorigi per aparta letero, kio estas elspeziga por SAT kaj malagrabla por oficistoj.
Nun vi posedas kongresaliĝilon. Aliĝu tuj, ĉar tio helpas al la OKK kaj krome estas malpli kosta. Ni estu nombraj en Alikanto, kie ni traktos gravajn punktojn koncerne la estontecon de SAT.
Salutas vin ĉiujn, via*

Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 52€
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

KOMUNIKO DE LA PLENUM-KOMITATO

La Plenum-Komitato de SAT sciigas la membraron, konforme al la Paragrafo 10 de la Statuto, ke ĝia mandato finiĝos la 28-an de februaro 2003.

Sekve de la lasta ŝanĝo en la Statuto, ni invitas ĉiujn individuojn kaj grupojn elekti siajn kandidatojn aŭ kandidati persone por la nova P.K. Ĉiu kandidato bone legu la paragrafon 13. de la Statuto. Por kandidatiĝi bonvolu procedi jene.

1. a) Individuaj (personaj) kandidatoj bonvolu sendi skriban kandidatiĝon, kun mallonga biografieto (sinprezento) kaj malgranda foto, al la SAT-sidejo, antaŭ la 15-a de majo 2002.

b) SAT-kolektivo aŭ grupo povas sendi liston de siaj kandidatoj - kun samaj indikoj kiel supre.

2. Ĉiuj kandidatoj, estos prezentitaj al la membraro unue en junia Sennaciulo, poste al la kongreso en Alicante, kaj fine decidos la ĝenerala referendumo en novembro 2002.

3. Dum la referendumo oni voĉdonos por ĉiu kandidato individue kaj la 8 kandidatoj kun plej granda nombro da jesaj voĉoj estos novaj Plenum-komitatanoj.

Dum la sama referendumo okazos elekto de la Ĝenerala Konsilantaro (por horzonoj). La sekretario de la Konflikt-Komisiono sendos cirkuleron al la Ĝ.K.-anoj por peti konfirmon pri ilia kandidateco. Novaj kandidatoj bonvolu sendi sian kandidatecon al la sekretario de la Konflikt-Komisiono, k-do Jakvo Schram.

En Parizo, la 1-an de februaro 2002
La Plenum-Komitato de SAT


ĈU VI PAGIS VIAN KOTIZON 2002 ?

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

Ivo PEYRAUT - 1934-2002



Yves (IVO) PEYRAUT naskiĝis la 14-an de septembro 1934 en Rochefort -sur-Mer, Francio. Jam kiel 16-jarulo li ekinteresiĝas pri Esperanto kaj lernas ĝin. Samtempe li fariĝas membro de movado de junulargastejoj, kiun frekventis diversaj tendencoj de la laborista movado. Inter ili estis reprezentantoj de la Esperantista laborista E-movado, membroj de SAT-Amikaro kaj SAT. Li tuj sentis sin bone kun ili kaj decidis aliĝi al SAT. Tion li faris en januaro 1953. Per sia E-instruisto, li estis honeste informita pri ĉiuj aspektoj kaj branĉoj de la Esperanto-movado. Tiel li povis tute libere elekti. Lia unua SAT-kongreso estis tiu de SAT en Duseldorfo (1952) kaj la unua UK estis tiu de Zagrebo en 1953. Finfine li konstatis ke la laborista E-Movado estas al li plej proksima. Dum sia juneco Ivo fondis plurajn laboristajn E-grupojn kaj aktivis en ili, kvankam tre okupita per siaj politikaj kaj profesiaj agadoj. Li fariĝas prezidanto de la Plenum-Komiutato de SAT en la jaro 1985 kaj estis reelektata ĝis la fino de sia vivo. Malgraŭ siaj sanproblemoj, k-do Peyraut tre aktivas kadre de la P.K. kaj estas unu el la ĉefaj motoroj. Li partoprenis (laŭeble) ĉiujn sekvajn SAT-kongresojn ĝis tiu de Nagykanizsa. Lia lasta U.K. estis tiu de Zagrebo, lastjare. Subita, neatendita sanproblemo forportis lin la 5-an de januaro 2002 en la aĝo de 68-jaroj. Li restos por ni inspiro kaj ekzemplo por la daŭra kaj senhalta lukto favore al pli bona kaj pli justa vivo.

K.B.

Nia asocio ricevis multajn atestojn de simpatio okaze de la forpaso de nia amiko Ivo. Ili venis de individuoj kaj organizoj. Ni elkore dankas al ĉiuj, kaj ĉar ni ne povas danki al ĉiuj persone kaj aparte, ni faras tion ĉi publike, per aperigo de preskaŭ ĉiuj el ili.

La P.K. de SAT

***

UEA - ROTERDAMO (NL)

Nome de UEA mi prezentas al SAT la plej sincerajn kondolencojn.
Pluraj el ni havis la eblecon sperti la homajn kvalitojn de Yves dum la kunlaborado por Esperanto en pluraj kampoj.
La forpaso de Yves estas granda perdo ne nur por SAT sed por la tuta Esperanto-movado.

Renato Corsetti
prezidanto de UEA

Kun granda malĝojo mi eksciis pri la morto de nia SAT-prezidanto, k-do Y.Peyraut. Mi esprimas kondolencojn al la francaj esperantistoj. SAT perdis sian gravan batalanton kaj estron.

Kun granda bedaŭro
Natalia Arolovîc (Rusio)

***

Mi ĵus legis la novaĵon pri la forpaso de Yves PEYRAUT kaj mi deziras esprimi al SAT miajn kondolencojn pro la perdo de tiom aktiva kamarado, kiu donis multon por la kresko de nia organizo.
Pezkore,

Atilio ORELLANA ROJAS (Nederlando)

***

Estimataj gesamideanoj!
Akceptu miajn sincerajn kondolencojn okaze de la morto de prezidanto de SAT s-ro Yves Peyraut.
Plenkore mi deziras al SAT, malgraŭ la perdo, persistan antaŭiron.

Tatjana Auderskaja kaj junulara E-klubo «Verdaĵo», Ukrainio

***

En la nomo de la SAT-membroj el la Belga regiono, mi sendas niajn kondolencojn al la familio de Ivo Peyraut, al Plenum-komitato kaj al SAT.

Jakvo Schram, peranto de SAT en Belgio

Estimataj kamaradoj,
pro la forpaso de la prezidanto de SAT mi sincere kondolencas al vi.

Detlev Blanke

***

Vere konsternita pro la trista novaĵo. La Parco lasis nin orfoj de nia kamarado Ivo, kiu ĉiam estis aktiva en la sino de nia Asocio kaj ankaŭ en la diversaj agadoj rilate al aktualaj sociaj problemoj. Grava perdo por ni ĉiuj. Li malfacile estos anstataŭigebla.

Malgaje, Liya kaj Marteno.(Hispanio)

***

AVE - (ASOCIO DE VERDULOJ ESPERANTISTAJ)
Dankon pro la informo ke k-do Yves ne plu vivas. Li restos ankaŭ en mia memoro kiel agrabla batalanto por la homaj kaj sociaj rajtoj. Dank'al li - finfine - ni sukcesis kunlabori pli intense kun SAT.
Li jam troviĝas en la nova AVENO 23/24 - necesas nur aldoni la etan honorigon.
Do, disdonu miajn kondolencajn salutojn laŭ via bontrovo.

Por AVE
M. Westermayer

Tiu bato pro morto de nia amiko Yvo lasas nin senvortaj. Mi tute ne ankoraŭ akceptis tiun veron kaj kunestas kun vi en doloro kaj volo je memoro de lia Lanti-spirito. Bonvolu transdoni al la SAT-estraro mian afliktan simpation kaj ricevu mian plej amikan fratecan manpremon je lia memoro kaj je nia komuna amikeco.
Kiel vi bone konkludis, al la laboro... sed ni ne forgesu iom tempe leki nian vundon.

D. Clopeau (FR)

***

Doroteo Enderby informis min pri la forpaso de Yves, kio estas por SAT granda perdo. Bonvolu transdoni niajn kondolencojn al la familio de Yves.

Franciska kaj Bernie (AU)

***


Min konsternis informo pri morto de k-do Yves Peyraut. Mi ne sciis pri lia farto, sed li bone aspektis en Nagykanyzsa. Bone ankaŭ li aspektas sur titolpaĝo de S-ulo N 11. Oni malfacile ekkredas.
Ni kondolencas al familianoj, parencoj, geamikoj k. al ĉiuj gesatanoj.

Grigorij Geĥt kaj Ilona Ĉudotvorova (UA)

***

Karaj geamikoj de SAT, rememorante la komunajn laborojn en Zagreb kun kamarado Yves, ni estas pli ol konsternitaj ekscii pri lia forpaso.
Akceptu niajn solidarajn pensojn.

Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia (BR)



Antaŭ deko da jaroj en SAT-ejo

Pri amiko, bonkorulo Yves Peyraut: mi parolis kun li plurfoje en Zagrebo (ni gastis ĉe la same hotelo). Mi ne povas kredi, ke mi ne plu vidos lin.
Bv. akcepti miajn sincerajn kondolencojn. Jen granda bato por ni ĉiuj.

Emocie, Paul Gubbins, Britujo

***

Vere bedaŭrinda evento. Ne nur por SAT - por la tuta e-movado monda. Ivo multe kontribuis al ties unueco (Strategiaj forumoj ktp.), lia agado estis grandega, kaj mi eĉ ne imagas, kiel ĉio funkcios sen lia ĉarma kaj fortega personeco. Transdonu miajn kondolencojn al ĉiuj amikoj.

Nikolao Gudskov (RU)

ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

Kun granda bedaŭro mi eksciis pri la forpaso de nia kara amiko kaj multjara meritplena kaj oferema SAT-gvidanto, Ivo Peyraut.
Mi konscias pri la fakto, ke temas pri granda bato por SAT kaj esprimas profundan kondolencon kaj kunsenton mianome kaj ankaŭ nome de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

Kamaradece via Petro Chrdle,
SAT-membro kaj ĈEA vicprezidanto, respondeca pri eksterlandaj aferoj.

Nekredebla informo ankaŭ min atingis. Mi ĝin devis denove kaj denove legi ...Do, mian plej profundan kondolencon al Vi ĉiuj. Via doloro estas ankaŭ mia doloro, ĉar Ivo estis ankaŭ mia Amiko ...

Kun bondeziroj restas Via, Vlada Hasala,
SAT Peranto en CZ Landoj kaj Prezidanto de ĈEA-a SAT Amikara sekcio, kun Filino Andrea.

FET (Esperantista Federacio de Laboro)

La komitato de FET, sciinte pri la forpaso de Ivo Peyraut, malĝoje kaj tre sincere kondolencas al SAT, SAT-anoj kaj familianoj de Ivo.

Komitato de FET

Grava perdo okazis en nia movado. Mi konatiĝis kun Yves Peyraut antaŭ 2 jaroj en la SAT-sidejo. Denove mi vidis lin okaze de la 1a maja manifestacio en PARIZO. En Nagykanizsa ni babilis kune. Mi memoros ke li bone prezentis SAT- en la E-movado kaj ekster. Mi sendas miajn kondolencojn al lia familio.

K-do Bruno HENRY (FR)

***

Solidaraj kondolencoj;
Eksciinte pri la forpaso de Yves PEYRAUT, el ITALIO solidarece partoprenas en ĉi tiu malĝojiga momento de la vivo de SAT:
Alberto BANDINI (Prato); Aldo CHIARUTTINI (Udine) Aldo FORMAGGIO (Chiavari); Antonio DE SALVO (Guidonia); Filippo GIUFFRIDA (Canischio); Giacomino MARTINEZ (Udine); Giancarlo RINALDO (Padova); Giovanni MARCHIORI (Verona); Mario GUZZI (Cogoleto); Paolo BONOMI (Verona);
kun kiuj mi telefone interparolis hieraŭ. Ne sukcesinte kontaktiĝi kun Ermanno MELLO (Bienno); Lina GABRIELLI-TRENNER (Ascoli Piceno); Renato CORSETTI (Palestrina), mi permesas al mi aldoni ankaŭ iliajn kondolencojn.

Fratece kaj solidarece via, Carlo BOURLOT (IT)

***

NATURAMIKOJ - FLANDRIO

En la nomo de Naturamikoj el la flandralingva regiono, mi sendas niajn kondolencojn al la familio de Ivo Peyraut kaj al SAT, kiu per la forpaso de Ivo perdis valoran kaj aktivan membron.

Stella De Weerd

Kun profunda malĝojo mi eksciis pri la morto de nia kamarado Yves PEYRAUT, prezidanto de la P.K.
Al ĉiuj, kiuj ĉeestos la morgaŭan ceremonion mi sendas la esprimon de mia kunsento kaj solidareco en tiu malĝojiga momento.

Michel DUC GONINAZ (FR)

***

Mi kondolencas pro la morto de Yves Peyraut. Mi ĵus lernis pri tio, en la listo de UEA. Mi sentis tion kiel baton, vere.

Jesuo de las Heras (ES)

Mi konis Ivo-n nur antaŭ 3 jaroj, kadre de la laboro pri la opinienketo. Okaze de tiu laboro, sed ankaŭ poste, mi povis vidi, kiom li laboregis por SAT, li laboris ĝis la fino, aŭ preskaŭ. Mi, kiu ĉiam parolaĉos, admiris lian elokventecon, kiu iom kompleksigis min, notinde kadre de la intervjuo, kiun li bonvolis fari al mi ĉe « Radio libertaire « (liberecana radio) pri « La Universalismo «. Ivo ne estis sennaciisto, sed li tamen rigardis simpatie nian frakcion : en Nagykanisza li partoprenis en nia kunveno kaj atente aŭskultis la parolantojn.
Ĉar mi nur sporade vidis lin, mi ne povas esti tiom malĝoja, kiel tiuj, kiuj regule laboris kun Ivo. Sed mi ege bedaŭras lian forpason, kiu, tio estas eŭfemismo, ne plifortigas SAT. Nome de la Sennaciisma frakcio de SAT, mi sincere kondolencas al ĉiuj kiuj, iele, proksimigis lin. Favore al lia memoro, ni daŭrigu la lukton !

Djémil Kessous (FR)



Dum la 63-a kongreso en Linz

De mia amiko Tibor Szabadi mi ricevis la funebran sciigon, ke mortis nia amata k-do Ivo P. Kontraŭ la morto oni apenaŭ povas fari ion. Ni scias ke iutage ĉiu mortas, tamen ni ne povas elteni senlarme, se nia bona konatulo, amata familiano mortas.
Ankaŭ nun mi ne trovas vortojn. Mi nur balbutas. Estus bone konsoli Vin kaj liajn familianojn, sed mi ne estas kapabla. Ankoraŭ somere ni babiladis kelkajn minutojn en Nagykanizsa kaj disiĝis kun esperoj, ke baldaŭe ni denove renkontiĝos dum iu SAT-kongreso. Nun jam mi scias ke tio neniam povos realiĝi. Ivo P. foriris por ĉiam, sed lia spirito restis kun ni.
Dum la enterigo image ankaŭ mi staros ĉe la katafalko enfermigante lin en mian koron.

Via A. Kovacs Bela (HU)

***

Miajn kondolencojn al la familio de Yves Peyraut kaj al liaj amikoj sendas.

Didje Loison (FR)

***

Jen la novaĵo, kiun ni esperis ne ricevi. Mian ĉagrenon kaj personan kondolencon bonvolu transdoni al la Plenum-Komitato de SAT kaj al la familio de Ivo.
Ni certe rememoros pri li okaze de la semajnfino 20-21 aprilo 2002 en KCE. Li admirinde tagprezidis la Forumon kiu, en Karolovaro, aprobis la unuan projekton de Konstitucio de la Esperanta Civito. Ankaŭ tiu paĝo aldoniĝas al la libro de liaj multaj meritoj por Esperantio.
Plej malĝoje kaj plej amike,

Perla Martinelli (IT-CH)

***

Delonge, mi admiris Yves, ĉiam afabla al ĉiuj, respektoplena pri ĉies opinioj, ...kaj kiu estis unu el la unuaj por subteni niajn agadojn ĉe la ekologistoj , por interesiĝi pri la triamondaj problemoj, ktp...
Mi kondolencas lian familion, ĉiujn liaj amikojn.
Kiel jam skribis pluraj el ni, la plej bona rimedo honorigi lin, estas pli energie agadi por la paco, la justeco, la respekto de ĉiuj homrajtoj, inkluzive, kompreneble, la rajton al facila internacia komunikado pere de esperanto.

Emilo Mas (FR)

***


FRANCA FERVOJISTA E-ASOCIO

Je la nomo de la Franca Fervojista Esperanto-Asocio, mi prezentas al SAT kaj al la familio de Yves Peyraut niajn plej sincerajn kondolencojn pro la perdo de grava amiko de Esperanto.

Jean Ripoche

Ni eksciis pri la forpaso de Yves (Ivo) Peyraut, prezidanto de la Plenum Komitato de SAT. Grava bato trafas nian tutmondan organizon. Ivo dediĉis multe da energio al nia afero. Antaŭ dudeko da jaroj, en 1981, konscia pri la graveco de la informado, li estis unu el la fondintoj de «Radio Libertaire» (Liberecana Radio) kiu dekomence frontis al malpermeso de la regpovo kaj policaj ĉikanaĵoj. Manifestacioj devigis la registaron ĉesigi siajn atakojn. Pri tio li verkis la libron «Radio Libertaire - La Voix sans maître» (Liberecana Radio - la Voĉo sen mastro) en 1991, okaze de ĝia dekjariĝo. Ironio de la sorto : Liberecana Radio festos ĉi jare la dudek-jariĝon de sia unua elsendo la 1-an de septembro. Liberecana Radio estas aŭdebla ne nur en Parizo sed ankaŭ en ties proksima ĉirkaŭurbo. Ĝi dekomence havis spacon por Esperanto kaj plue informas nun pri kaj per ĝi ĉiun vendredon per FM : 89,4 MHz, inter la 18-a kaj 19-a. Ĝi cetere multe uzas la informojn de la Gazetara Servo de SAT-Amikaro. Ne malmultaj eksterlandaj esperantistoj trairintaj Parizon cetere havis la okazon esti akceptitaj kaj intervjuitaj. Ne ekzistas pli bona kaj bela omaĝo al la memoro de Ivo ol plue labori, perfektiĝi, akiri pliajn konojn, fariĝi senĉese pli efika, ĉar dum tiu dolorplena momento daŭre alvenas ankaŭ kuraĝigaj novaĵoj el kiuj parto rezultas el lia laboro. Tiel iras la vivo.

H. Masson (FR)



Dum la laborkunsido en Nagykanizsa

Ĵus malferminte mian leterskatolon mi eksciis pri tiu-ĉi malbonega novaĵo. Apartan memoron mi havas pri Yves Peyraut dum la kunsido de ATEO, dum la UK en Zagreb, kie li partoprenis, kaj havis tute trafajn vortojn. Mi tre bedaŭras lian forpason, kaj sendas al Sat-anoj kaj al la proksimuloj de Yves miajn sincerajn kondolencojn.

Claude Nourmont (LU)

***

Kun profunda malĝojo ni eksciis pri la morto de k-do Yves Peyraut. Ni bone konis tiun agrablan, bonkoran homon. Esperanta movado perdis bonegan organizanton.
Ni kondolencas al ĉiuj gesatanoj kaj al familianoj de k-do Yves Peyraut.

Odesaj samideanoj (UA)

***

La informo pri la morto de k-do Ivo konsternis min. Mi sendas miajn elkorajn kondolencojn al lia familio kaj amikoj de li.

Tutestime salutas ! Pelle Persson (SE)

HILELISTA ESPERANTO KOMUNUMO

Ĵus mi eksciis pri la morto de la prezidanto de la Plenumkomitato de SAT - Yves Peyraut, eminenta esperantisto kiu multege faris kaj por Sennacieca Asocio Tutmonda kaj por la tuta Esperantujo.
Nome de HEK mi sendas al SAT la plej sincerajn kondolencojn!

Mato Ŝpekuljak
la kunordiganto de HEK

Kun ĉagreno mi kaj Ralalarisoa Justine, kiu konatiĝis kun Yves Peyraut pasintjare kiel kunvojaĝanto al Hungario kaj UK en Zagrebo, ni eksciis pri lia forpaso. Ambaŭ ni prezentas niajn sincerajn kondolencojn al la familio kaj SAT.

Eugeno RAVELOSON (Madagaskaro)

Ivo ne plu estas inter ni. For!
Ni kapablu pluvivi asocie sen li! Tamen la manko estas grandega.
Mi mem aparte ŝatis la kvietecon, kiun li disradiis ĉirkaŭ si, precipe en nia SAT. Danke al li, mi mem ĝuis preskaŭ du pozitivajn jardekojn sen tro da internaj disputoj, kiuj antaŭe venenigis nian asocion. En certa epoko, estis amuze verki en esperantaj gazetoj: «Se vi ŝatas politikajn disputojn, vi partoprenu en SAT-kongreso okazonta en xx.». Ivo balais tion.
Tiu pozitiva periodo estis ebla danke al ŝajnaj personaj kvieteco kaj optimismo, kiu trovis sian fonton en profunda socialisma filozofio en kompleta SAT-spirito. Li mem estis konvinkita, ke socialismo venos el grandega forumo, kaj el senlima diverseco. Sendube lia ag- kaj pens-maniero estis plene sennacieca kaj sendogma.
Konsekvence li scipovis aŭskulti aliajn opiniojn kaj proponojn tute diversajn. Estas danke al tiu mensa malfermo, ke la Amikeca Reto interalie kreiĝis dum SAT-kongreso. Mi parolas pri miaj personaj spertoj, ĉu ne? Mi atestu pri tio!
Estas evidente ke nia movado devas evolui laŭ la nuntempaj socialaj premoj. Ivo preparis tiun evoluon en plena SAT-spirito kaj en kadro de klasbatalo, sen kiu ne estus progreso.

Ivo! Ni plubatalos!

Gerardo Rollin (FR)

***

Kun granda malĝojo mi legis cian mesaĝon pri la morto de nia amiko Ivo.

Klaŭdo ROUX (FR)

***



La lasta venko de Ivo, ekspozicio pri Laborista E-Movado en Parizo

Nekredebla sciigo de RET-INFO pri forpaso de Ivo!!
Terura perdo por ĉiuj kiuj konis lin !

Kortuŝite, Vaclav Stiburek (CZ)

Mi informis en nia listo argent-reto pri la forpaso de nia prezidanto Kamarado Ivo, kaj ankaŭ mi informis al kamarado Rodolfo Calogero kaj aliaj ni kune kondolencas unu la alian.
Sed ni firme kredas ke en la tutmondiĝo ni bezonas pli kunigi niajn fortojn por nia daŭrigota batalado por justeco, solidareco en la homaro. Argentino, nia lando estas en tre malĝoja momento kaŭze de la ekonomia falo antaŭ IMF...
Salutu la kamaradaron nome de argentinanoj.

RoSartor, el Buenos Aires (AR)

Kun doloro mi eksciis la forpason de via prezidanto. Mi nur renkontis lin unufoje, sed lia lerteco kaj bona humoro faris al mi grandan impreson. Tio estis je la 5a de oktobro 2001, okaze de radio-elsendo pri la 20a datreveno de naskiĝo de priesperanta programo ĉe Radio Libertaire en Parizo.
Mi prezentas mian plej sinceran kondolencon kaj deziresprimas multan kuraĝon al vi en tiu provo.
Amike,

Bertrand Hugon,
prezidanto de Junulara Esperantista Franca Organizo

Kun bedaŭro mi legis la «informon» pri la forpaso de amiko Ivo!!!
El mia tuta koro mi sendas mian kondolencon al PK kaj al liaj geparencoj!
Plej amike k kortuŝe:

Szabadi Tibor (HU)

***

Mi malĝoje ploras informite pri la forpaso de la kara kamarado Peyraut. Kiom granda perdo! Mi ne havas vortojn por esprimi la bedaŭron.

Japana membro de SAT,
TAHIRA Masako (JP)

***

KOLOMBIA ESPERANTO-LIGO

Ni bedaŭras la forpason de S-ro YVES PEYRAUT, eminenta esperantisto apartenanta al SAT.
Amike via,

Kolombia Esperanto-Ligo el Bogoto
Santiago Alvarez


OOMOTO

Kun ŝoko kaj peza koro ni eksciis pri la forpaso de via prezidanto, Ivo (Yves) Peyraut. Lia agado por Esperanto tuŝis tre multajn homojn tra la mondo.
En la nomo de Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto mi sendas al vi kaj liaj familianoj plej sincerajn kaj elkorajn kondolencojn.
Liaj kamaradoj kaj li restas en niaj preĝoj.
Sincere kaj amike via,
Kyotaro Deguĉi
Prezidanto de Esperanto-propaganda Asocio de Oomoto

Mi ŝokiĝis, ĉar mi aŭdis ke li estis, post malsaniĝo, mense tute sana. Mi ne scias, kiel kompensi ĉi tiun perdon.
Ni varbu al SAT pli da membroj, kaj tiele progresigu la asocion! Tio certe estos la plej bona kialo por rekompenci lian volon.

Tani Hiroyuki (JP)

***



Kun urbestro de Nagykanizsa kaj k-do Szabadi, antaŭ la fino de la kongreso

La forpaso de Ivo alportas amasojn da mesaĝoj por prezenti kondolencojn al lia familio kaj al la P.K, ĉu en la diskutejo, ĉu rekte ĉe SAT. Kaj certe samas en la diversaj medioj en kiuj li estis agema. Mi volas aldoni la miajn.
Certe estas tro juna por jam morti, sed post tiu sanatako mi demandiĝas kiel li povus adaptiĝi al reduktita vivo jam bremsita pro lia koro ? Mi memoras ke antaŭ unu aŭ du jaroj, li diris al mi ke li jam vivas plusajn jarojn kompare al sia patrino.
Venontan mardon la 15an de januaro, posttagmeze certe svarmos homoj por lin saluti lastfoje ĉe la «Muro de la Federantoj» en tombejo «Père Lachaise», tute proksime de nia sidejo. Kaj tiuj, kiuj estas malproksime, havos penson al li.
Ni esperu ke nia asocio havas, kaj havigos al si, sufiĉe da tiaj fortaj personecoj por daŭrigi sian agadon.

Tereza Sabatier (FR)

***

ESPERANTA PEN-CENTRO

Esperanta PEN-Centro sendas sian sinceran kondolencon pro la forpaso de kamarado Ivo Peyraut.

Judit Felszeghy, sekretario

Mianome kaj nome de la israela esperantistaro akceptu la plej elkorajn kondolencojn al la familio de k-do Peyraut kaj al la tuta SAT.

Jehoŝua Tilleman (IL)

POLA RADIO - E-REDAKCIO

Akceptu en la nomo de la E-Redakcio de Pola Radio la plej profundajn kondolenco-esprimojn. La informo ege ĉagrenigis nian redakcian stabon. Baze de la korespondaĵo de Henri Masson en nia lunda novaĵbulteno ni peris al ĉiuj niaj aŭskultantoj ĉi tiun afliktigan informon, elstarigante la rolon de Y. Peyraut en la establo de «Liberecana Radio» .

Sincere, Barbara Pietrzak
la Estro de la E-Redakcio de PR

Estimataj kamaradoj en SAT,
Bonvolu akcepti mian elkoran kondolencon okaze la forpaso de la kamarado IVO (YVES) PEYRAUT.
Sincere via,

Reza Torabi - Irano

***

ERA - «ESPERANTO» RADIKALA ASOCIO

Per tiu mesaĝo ERA («Esperanto» Radikala Asocio) prezentas al SAT-estraro, al ĉiuj ĝiaj membroj kaj kunlaborantoj, la senton de partopreno al la doloro pro la forpaso de samideano Yves Peyraut.
Temas pri grava perdo de la esperanto- kaj de la laborista- movadoj konsidere de lia plurjara laboro ankaŭ politika favore al esperanto kaj ĉiuj ĝiaj idealoj.
Korajn salutojn,

la Sekretario Giorgio Pagano ankaŭ nome de la tuta ERA-estraro.

Mi estas ŝokita leginte la malgajegan novaĵon. Kiam mi vizitis Parizon unuafoje en lasta oktobro, Ivo faris intervjuon al mi por «Radio libertaire» dum la kunvespermanĝo en la domo de Tereza. La vespero estis gaja, Ivo multe klarigis al ni pri kultura historio de sendependa radio, laŭ mia peto. Ĉiuj homoj tie tute ne povis imagi tian subitan morton de nia kamarado. Mi havis ankoraŭ multe da temoj por diskuti kaj agadi kune kun Ivo, tamen ....sed jes, Ivo daŭre restas en mia koro kaj memoro.

Kamaradece Viola (JP)

***

Ni ĵus estis informitaj pri la forpaso de nia kara kamarado Ivo. Tre bedaŭrinda novaĵo. Ni scias ke li multege kaj efektive laboris por SAT kaj la tuta Esperanto-Movado. Lia ekzemplo estas sekvinda de ĉiuj kiuj kunbatalis por la sama celo. Niajn plej sincerajn kondolencojn al liaj familianoj kaj ĝenerale al ĉiuj SAT-anoj.

Ramona kaj Eduardo Vivancos (CA)

***

Miajn sincerajn kondolencojn pro la morto de k-do Peyraut! Li tro frue forpasis de antaŭ ni, tiel juna! Mi ne sciis ke li estas kvar jarojn malpli aĝa ol mi. Quem di diligunt... Memoro pri li en Nagykanizsa kaj en Zagrebo estas ankoraŭ freŝa en mia menso.

YAMASAKI Seikô (JP)

SAT EN BRITIO - SATEB

Je la 6a de januaro la novaĵo atingis nin pri la morto de Kamarado Ivo. Nome de SATEB ni kondolencas la familion de Ivo.
Ni devas daŭrigi la batalon al kiu li dediĉis sian vivon.

P. Simons, prezidanto

Kun la plej granda tristo mi eksciis pri la morto de Kamarado IVO (YVES) PEYRAUT, prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT. Li restos en mia memoro kiel persono la plej malfermita por la aferoj de Esperantio. Mi renkontis lin en Karlovaro. Ni diskutis pri multaj aferoj. Li manifestiĝis kiel homo kuraĝa, bonhumora, inteligenta, bonkora. Esperantio perdas unu el siaj plej talentaj homoj. Bonvolu akcepti miajn profundajn kondolencojn.

Walter Zelazny (PL-FR)
(La konsulo de la Esperantia Civito)

LA LASTA AKOMPANO

Marde, la 15-an de januaro 2002 je la 14 horo komenciĝis kolektiĝi en la konata pariza tombejo «Père Lachaise» amaso da homoj. Temis pri familianoj, amikoj, kamaradoj, kompanoj de nia karmemora Ivo, (eĉ el Belgio alvenis niaj gekamaradoj C. Staquet kaj G. Vanderputten) por lastfoje akompani lin al la kremacio. Diversaj asocioj en kiuj li aktivis (inter ili evidente ankaŭ SAT) preparis kun la familianoj la adiaŭan ceremonion, kiu okazis en granda salonego de la krematorio. La salonego estis tute plena, kaj ĉar ĉiuj seĝoj estis okupitaj, preskaŭ duono de ĉeestantoj devis stari. La ceremonio komenciĝis per la alporto de la ĉerko, kovrita per la ruĝa-nigra anarkiista flago. Laurence, la filino de Ivo, dankis al ĉiuj pro la ĉeesto kaj klarigis la disvolviĝon de la ceremonio. Dum la unua duonhoro parolis familianoj kaj la reprezentanto de la Anarkiista Federacio. Kun la paroladoj alternis bele elektitaj pecoj de klasika muziko. Post duonhoro la ĉerko foriris al la cindrigo kaj sekvis dua parto de la ceremonio en kiu parolis reprezentanto de sindikato CNT, de Liberecana Radio, de Radio Esperanto, SAT kaj SAT-Amikaro. La intervenoj de SAT kaj SAT-Amikaro estis en Esperanto kun franca traduko. Ja nia Ivo estus certe tre kontenta ke oni parolas en Esperanto. Cetere, eĉ dum la lastaj tagoj en malsanulejo li volonte parolis en Esperanto (kun grandaj parolmalfacilaĵoj) - ĉar en Esperanto li estis pli facile komprenebla. Fine de la ceremonio, parto de la ĉeestantoj foriris kaj la alia atendis la alvenon de la urno kun cindro. Je la 17-a horo la urno alvenis kaj tiam ĉiu el la ĉeestantoj, ricevante unu dianton, estis invitata iri al la «Muro de Federuloj» (muro kie estis ekzekutitaj francaj revoluciuloj en 1871). Ni ĉiuj metis nian dianton ĉe la muro kaj la kvar infanoj de Ivo disĵetis lian cindron ĉirkaŭ la arbo apud la muro. Tio ja estis la deziro de Ivo kaj ĝi estas plenumita.

Nun estos granda malpleno en la aktuala P.K. de SAT. Ivo estis ne nur prezidanto de la P.K. sed ĉefa motoro kaj animanto. Kun li niaj kunvenoj neniam estis tedaj, ĉiam li havis ideojn, proponojn, ofte rakontis ŝercojn por agrabligi etoson. Li sekvis ĉion kaj estis informita pri ĉio. En la lastaj jaroj, pro malbona sanstato, li forlasis aktivecojn en diversaj asocioj, sed ne en SAT. Ĉiun merkredon, tagmeze li aperis ĉe la pordo de la oficejo (spirante forte pro pena marŝado), sed kelkajn minutojn poste ĉio estis denove normala. Li komencis labori pri arkivoj, pri aktualaĵoj el la reto, pri gazetoj ricevitaj, serĉante interesajn inspirojn kaj tekstojn por helpi al via redaktoro produkti kiel eble plej interesan kaj aktualan Sennaciulon. Ĉiun duan merkredon en la monato ni kune preparadis vesperan kunvenon de la P.K. Liaj plej karaj kaj gravaj taskoj estis batalo por liberigo de nia amiko Sekvojo, por liberigo de niaj rusaj gekamaradoj kaj la preparo de la Nova PIV. Tiujn dosierojn li regule konsultadis kaj traktis (ja, li multe laboris ankaŭ en sia loĝejo). Bedaŭrinde, subita morto malebligis al li fini (sukcese) tiujn dosierojn. Nu, nun estas nia tasko fini ilin kaj laŭeble tiel, kiel nia Ivo imagis, per sukceso. Kara Ivo, ni certe faros ĉion por realigi kaj sukcesigi ciajn klopodojn. Ni promesas, kiel ci faris, daŭre batali por la forta Laborista E-Movado, por forta kaj sukcesa SAT.

Ni havis ŝancon havi cin inter ni. Saluton mia kamarado, mia amiko Ivo.

Kreŝo

Letero al la patrino

Argentinano vivanta en Meksikio skribas al sia patrino (80-jara) en Argentinio

Mexicali, México, Dimanĉo, Januaro 6 -2002

Kara Patrino:

Hodiaŭ estas la tago de la Tri Sanktaj Reĝoj. Mi ne forgesas pri la ĉeko kiun mi devas sendi al vi, sed neeblas hodiaŭ sendi monon al Argentinio.

Oni simple ne scias ĉu la mono tie estas «peso» aŭ «dolaro». Eĉ se ĝi fakte estas «peso» oni ne scias en la Bankoj Meksikiaj **kia** peso ĝi estos (eble duono de la antaŭa ?)

Mia najbaro (meksikia) ŝerce demandis al mi: «Ĉu hodiaŭ ankoraŭ ekzistas Argentinio ?»

Ĉio tio pensigis min pri Argentinio, nia kara lando. Oni parolas en la TV-novaĵoj de «Argentinio humiligita kaj ellaciĝinta, politike kaj ekonomie.»

Argentinio estis bona kun Usono, sendis soldatojn al la militoj de la Organizaĵo de la Atlantika Pakto, obeis ĝisfine la Fonduson Monan Internacian, kiu iam antaŭnelonge deklaris ke «Argentinio estas nia modelo antaŭ la mondo.»

Tio povas esti vero, sed nur kontraŭ-komprenante la frazon.

Nun Buŝ kaj la FMI forlasas kaj ne apogas al Argentinio iel. Usono konsilas ke Argentinio obeu la FMI, kies konsiloj metis Argentinion en la nunan staton.

Tre konfuzige la Argentinia registaro kaj la partioj politikaj kiuj kontraŭstaras la registaron. sekvas egalan programon ekonomian, kaj la lukto estas nur por atingi pagitajn registarajn postenetojn.

La Parlamento en Argentinio obeas al la Don Korleone Financa. Argentiniaj Bankoj frizas la ŝparkontojn de la publiko kaj samtempe kreskas maldungo, valoro de la peso, inflacio kaj recesio.Tamen recesio estas monda problemo, kio tute ne helpas al iu.

En Argentinio paraliziĝas la tri konstituciaj povoj kaj implicite estas imuneco je la rabado de la bankoj al la publiko, same kiel okazis en Meksikio en 1994. Oni diras naive ke la politiko argentinia estas gvidata el la strato mem.

Daŭras la samaj politikaĉistoj, malgraŭ siaj ĉiamaj eraroj, malgraŭ falo de la salajroj, malgraŭ forgeso pri la orfoj civilaj, militistaj kaj policistaj. Daŭras la samaj surstrataj paradoj kronikaj de la mizeraj emerituloj (kiel vi) petante pli ol 60 dolarojn monate.

Oni ne trovas, eĉ en la grandaj urboj de Argentinio necesajn medikamentojn. La apotekistoj atendas la falon de la valoro de la peso, por scii kiu estas la vera prezo de iliaj produktoj kaj varoj.-

Daŭras la spekulado de bankoj kaj financistoj, kies aktivecoj estas ne-regulitaj de iu ajn leĝo !! Eŭropaj kapitaloj fuĝas protektitaj de Ministro Cavallo (jam ne plu Ekonomia Ministro). La sangaj sociaj eksplodoj, la rabado de la butikoj de malsatantaj popolamasaj svarmoj, la manifestacioj de la trompitaj ŝparintoj, estis ĉiuj haltigitaj per kugloj.

Tre malmulte filtriĝis el la internaciaj novaĵoj.Mi scias pri tio per la reto, kaj per leteroj de amikoj vivantaj en Argentinio. La nombro de mortoj pro policaj kugloj varias laŭ la informanto.

Sed ili asertas ke ne povas esti surprizoj nun, post dek jaroj de senĉesaj strikadoj laboristaj kaj instruistaj.

Salajroj de 300 dolaroj monate estis plue reduktitaj !

Tiu «eta strata nova politiko» (laŭ la meksikiaj ĵurnaloj) staras ekster ĉia mucida partio politika. La diferenco kun la Armeo Zapatista de Nacia Libero (EZLN) en Ĉiapas, Meksikio, ankaŭ eksterpartia, estas ke la EZLN pacas kun la nuna faŝisma Registaro de Meksikio-Partio de Ago Nacia-PAN.

Krome la Armeo Zapatista estas moderne kaj abunde armita kaj posedas progresigan komunikan teknologion.

Tio ne estas la kazo de la strataj svarmoj en Argentinio.

Ĉi tiuj Latinamerikaj movadoj estas potenciale gravaj ĉar ili ne estas kontraŭ la socia ordo, sed nur kontraŭ la NUNA ekonomia ordo, per kiu 95 % el la lando kaj la tera riĉaĵo, apartenas al nur 10 % el la homoj. Tiuj etaj politikaj movadoj Latinamerikaj ne estas danĝeraj por la ekzistanta «ordo» kaj tute ne havas leĝan reprezenton.

Sed iel simile okazis la Franca Revolucio, kiam la popolamaso komencis vidi ke « la malriĉeco, la necerteco, la malsato, kaj la homa sango verŝita sur la stratoj estas ankaŭ la mia.»

Paca sociekonomia revolucio estas revo neniam komencata en Argentinio.

La «nacia identeco» estas afero de la pasinto. «La unua lando en Latinameriko tute alfabetigita» estas afero de la pasinto.

«La senpaga eduko je la tri niveloj» estas afero de la pasinto.

San Martin, Sarmiento, Peron, la tritiko kaj la tango estas nur HISTORIO.

Cent mil junaj malaperintoj kiuj rifuzis submetiĝi inter 1960 kaj 1980 jam ne estas bonaj eĉ por memoro.

Nuntempe estas la mensogo ekonomia kaj politika, la malvera kredo je «memdecida nacio».

La bruaj surstrataj plendoj estas tre malproksime de Revolucio Paca Ekonomia kaj Socia.

Mi iris al Pekino kaj Moskvo dum la somero de 2001, kaj tie la junuloj demandis ĉu mi konis la futbaliston Maradona persone!

En Argentinio estas konstantaj modifoj de ĉio, sed neniu vera ŝanĝo ekonomia kaj socia.

La granda Ekstera Ŝuldo estas mensoga fabrikaĵo, sed nekompreneble, la temo ne estas tuŝata dum dialogoj.

Tuj kiam mi scios kio okazas kun la argentinia peso mi sendos al vi ĉekon por la manĝo.

Dume bonvolu pacience malsati. Fasto povas esti bona por la sano, tamen ne por la vivo.Mi kredas ke Budhao diris tion.

Elkore
via filo
Ruben Feldman Gonzalez

SR-redaktoro atendas interesan materialon. Ne forgesu lin !

El la SAT-sidejo

67 avenue Gambetta
FR-75020 Paris
Tel: +33.1.47.97.87.05
Fax:+33.1.47.97.71.90
Rete: satesper@noos.fr

FONDUSO POR NOVA P.I.V.

Kiel vi jam estas informitaj, la laboro pri Nova PIV bone evoluas kaj ni esperas ke post kelkaj monatoj ni povos eldoni ĝin. Ĝi devus esti tute renovigita, ĝisdatigita kaj vere ilustrita, t.s. ke la ilustroj estos enkorpigitaj en la teksto mem.-
La eldonkosto de tiu nova ĉefverko de nia lingvo estos tre alta kaj pro tio ni decidis malfermi Fonduson por la eldono de tiu nova PIV.-Ĉiu esperantisto kiu deziras helpi en tiu entrepreno povas sendi monon al tiu fonduso.-La nomoj de kontribuantoj kaj sumoj regule aperos en Sennaciulo.-Se iu ne deziras ke lia/ŝia nomo aperu en tiu listo, ĝi aperos anonime.-La monon bonvolu sendi al la poŝtkonto de SAT :
n° 1234-22 K, Paris (en Francio)
n°-30041-00001-0123422K-020-39 (el eksterlando)
kun indiko “Por la Fonduso de Nova PIV”.
Ni anticipe dankas al ĉiuj kontribuantoj.-

La P.K.-de SAT

FINIĜIS ANTAŬPAGO POR NOVA P.I.V.

Dum la kongreso en Nagykanizsa, SAT decidis fini la antaŭpagperiodon kun rabatita prezo por la nova PIV. Ekde ĝia apero oni povos aĉeti ĝin laŭ la normala vendoprezo. La definitiva vendoprezo kaj la aperdato de la nova PIV estos anoncitaj en la reto kaj en E-gazetaro.

FONDUSO PIV
Cuenot 5,36 €

FONDUSO SEKVOJO
anonime 48 €

NEKROLOGO

La 23-an de decembro mortis en Wannweil (DE) 73-jara, nia malnova kaj fidela membro, kamarado

Fredo BÖHRINGER
(matr. 25.464)

Niaj pensoj iras al nia kamaradino Lisel, lia edzino, al filino Ursula kaj al la tuta familio.

SAT havas novan domajnadreson: **sat-esperanto.org**

HELPO AL LA ASOCIO

En Francio (€) Djemil Kessous memore al Y. Peyraut, 15,24; Nové 4,62; Ge-Rapley 80,45; Cnudde 2; Dehan 2; anonime por Internet 96; anonime por nepagipova kamarado 48; L. Robert 17; Gibaux20; Ge-Chevrolat 20; Espanol 8,41; Orliange 43; Sadier 4,22; Weiss 27,00; Selle 8,41; Calas 15,27; Blary 2; Dufourg 2; Bouchet 54; Schneider 5,36; Sabatier memore al Ivo Peyraut 30;
En Germanio (€) Haberland 2,13; Scherm 25; Brandenburg 6,5; Bolter 12,36; Ehlers 6; Paech 81;
En Pollando (PLZ) Burszta 15,00; Bogdziun 15,00; Janusz 5,00; Ulanowski 10,00;

Novaliĝoj

Nia hispana kamarado, kiu aperis anonime deziras ke lia adreso aperu, do:

35501 Salguero Rodriguez José Maria, Strato Rena 11 bajo derecha, ES-06400 Don Benito, Hispanio.
35.519 Miles Petro, 137, Penrose Avenue, Watford, WD19 5AA, Britio
35.520 Karatzaferis Nicolas, 9, rue du Pioch, FR-30250 Junas, Francio
35.521 Markov Vito, 61 Boulevard vauban, FR-78180 Montigny-le-Bretonneux, Francio
35.522 Del Barrio Unquera José Antonio, Inspector Juan A. Bueno 11-7° D, ES-28924 ALCORCON (Madrido), Hispanio.
35.523 Garcia Iturrioz Miguel, Bidebarrieta 10-1 D, ES-48930 Getxo (Vizkaya), Hispanio
35.524 *Nakazawa Etsuko, Bidebarrieta 10-1 D, ES-48930 Getxo (Vizkaya), Hispanio.
35.525 *Raposo Berta, El Justicia 21, ES-46120 Alboraya, Hispanio.
35.526 *Grigorieva Irina, Str. Augusto G. Linares 3-3° C, ES-39006 Santander, Hispanio.
35.527 Garcia Angel, Str. Augusto G. Linares 3-3° C, ES-39006 Santander, Hispanio.
35.528 Dony Jacques, 3bis rue Jean Jaurès, FR-42150 La Ricamarie, Francio.
35.529 Schaefer Thierry, 2 rue Bruat, FR-68000 Colmar, Francio.
35.530 *Szubryczynska Grazyna, ul. Sobieskiego 47/1, PL-87-100 Torun, Pollando
35.531 *Kostrzewska Beata, ul. Swietopelka 12/11, PL-87-100 Torun, Pollando.
35.532 Leriche Charles, 87 rue de la Vilette, FR-59300 Valenciennes, Francio
35.533 Kawanisi Teturo, Sugiuramati 7, JP-920-0972 Kanazawa, Japanio
35.534 Nakamura Daishin, Daidenhaitu 105, Iwadono 741-2, JP-355-0065 Higasimatuyama, Japanio.

Viaj reagoj....

Sennaciismo

Interesis min la teksto de la ĵus de SAT eldonita seslingva flugfolio «Temas pri demokratio!», aperinta en S-ulo de decembro 2001 (p. 171). La komenco estas bona, sed min maltrankviligis la eldiro: «Apud nia gepatra lingvo ni bezonas lingvon *komunan, sendependan, alireblan al ĉiuj, kiu subpremas neniun kulturon, kiu eliminas neniun minoritaton.*» [kursivigo de mi].

Laŭ mi, Esperanto devus helpi subpremi (argumente, ne perforte) precipe unu kulturon: tiun de naciismo, inkluzive la senliman kultadon de etnaj identecoj kaj etnaj diferencoj, kiu regule akompanas la naciismon en ties moderna formo. Aŭ ĉu estas evidenta miskompreno supozi, ke la «kulturo» menciita en tiu frazo povas esti alia ol «etna kulturo» kaj la «minoritato» io alia ol «etna minoritato»? Precipe la vorton «kulturo» oni ofte uzas tiusence, kaj pro tio la plimulto de legantoj kredeble aŭtomate komprenos, ke temas pri etnaj kulturoj.

La tempo estas jam matura por pli emfaze atentigi pri la naciismaj antaŭjuĝoj, kiuj subkuŝas lingvouzon, ĉe kiu:

- «kulturoj» egalas al «etnaj kulturoj» (kvazaŭ aliaj paradigmoj de kultura diferenciĝo ol la etna ne ekzistus),
- «identeco» egalas al «etna identeco» (kvazaŭ tiu lasta estas aŭ estu la kerna identeco de ĉiu homo),
- «hejmlando» signifas «devenlandon», ktp.

Aldoniĝas la demando, ĉu vere tutmonde ĝeneraliĝinta Esperanto efikus alie al etnaj kulturoj kaj lingvoj ol tutmonde ĝeneraliĝinta angla aŭ alia etna lingvo.

Mi esperas, ke estonte oni pli debatos en SAT pri demandoj de publika Esperanto-informado. Nedisigeble kunnoditaj estas la «poresperanta» agado (informado) kaj la «peresperanta» (disvastigo de politika mondrigardo).

Gary Mickle, 35083

Respondo al Nora Caragea

Ĝis nun ankoraŭ ne okazis SAT kongreso en Hungario. Kompreneble ni tre klopodis organizi ĝin por ke ĉiu partoprenanto estu kontenta. Verdire ni sciis ke absolute bone organizita kongreso, Esperanto aranĝo, ne ekzistas.

Tamen ni esperis ke la 74-a Kongreso de SAT en Nagykanizsa estos neforgesebla kaj ĉiu kongresano iros hejmen kun karaj memoroj.

En via kazo ne tio ĉi okazis, eĉ laŭ ni Nagykanizsa enskribiĝis en vian cerbon, kiel terura loko, kie vi travivis malagrablaĵojn.

Ni tre tre bedaŭras. Eble venontfoje se okazos la kongreso de SAT en Hungario la tie ĉi pasigitaj tagoj estos pli belaj kaj „sunriĉaj" por vi.


Mi ne ŝatas diskuti, eĉ disputi kaj pruvadi niajn kontraŭargumentojn. Ja ĝis nun escepte vin neniu diris pri ni malbonon. Grandparte la partoprenantoj estis kontentaj malgraŭ la malfacilaĵoj.

Ŝajnas al mi, se ĉio irintus glate vi serĉus kazon por kritiki nin pensante: en tiu ekssocialisma lando vivas homoj, kiuj memstare nenion povas fari sen la helpo de „la saĝaj okcidentanoj". Eble tio ĉi estis nia plej grava kulpo en viaj okuloj.

Plu mi ne intencas diskuti kun vi, ĉar certe mi ne povus konvinki vin.

Kovács Béla

La sekretario de la 74-a Kongreso de SAT.



Precizaj demandoj al la anarkiistaj membroj de Amnestio Internacia

Kiel sekretario de la grupo "89 Strasburgo" de Amnestio Internacia - Sekcio Franca, mi kompreneble ĝojas, ke la 74-a kongreso de SAT instigas SAT-anojn partopreni en la agado de Amnestio Internacia.


Sed mi ne komprenas, kial la anarkiistaj kongresanoj ne voĉdonis kontraŭ tiu punkto de la gvidrezolucio? Mi ne perdos tempon por ideologiaj konsideroj, sed metos precizajn demandojn, ligitajn kun la konkreta agado de mia grupo :

- mia grupo aktivas por la liberigado de egiptia sufismanino* malliberigita pro sia religia aktivado. Ĉu anarkiisto defendas la rajton de ĉiu homo praktiki sian religion?
- ĉe la 50-jariĝo de la Universala deklaracio de homaj rajtoj, ĉiu membro de Amnestio Internacia en la mondo devis kolekti subskribojn de homoj sin devigontaj fari ĉion, kion ili povos, por ke estu efektive aplikata tiu teksto de UNO. Ĉu anarkiisto povas promesigi al homo, ke li aŭ ŝi respektos tekston de UNO?
- Amnestio Internacia kampanjas por la kreado de la internacia kriminala tribunalo. Mia grupo baldaŭ devos skribi al pluraj ŝtatestroj por peti, ke iliaj ŝtatoj ratifu la traktaton, kiu kreas tiun tribunalon. Ĉu anarkiisto povas skribi al ŝtatestro por peti, ke li kreu tribunalon?

De simpatianto mia grupo povas a kcepti, ke li partoprenu nur en parto de la agadoj de la grupo. Sed membro devas esti preta partopreni en la tuta aktivado. Do, se anarkiisto volos aliĝi al la grupo de Amnestio Internacia, kies sekretario mi estas, mi kompreneble kore akceptos lin. Sed mi detale priskribos al li la agadojn de la grupo, kaj klare avertos, ke li devos partopreni en ĉiuj. Se liaj politikaj konvinkoj kontraŭas parton de nia agado, ni ne povas akcepti lin kiel membron, sed nur kiel simpatianton.

Jacquelin Lépeix

*Sufismo: ne PIV-a vorto, temas pri mistika branĉo de Islamo kiu akcentas la internajn spertojn.



La plej grava problemo de SAT

SAT bankrotos en ĉirkaŭ kvar jaroj.

Tio estas simpla aritmetiko : en 2000 ni perdis 30 715 FRF, pli-

malpli tiel estis en lastaj jaroj; tio signifas ke ni formanĝos la nunan kapitalon de 132 406 FRF en kvar jaroj. En la lasta jaro, ĝi estis kvin jaroj.

Malmulte da kamaradoj maltrankviliĝas pri tio, kaj demandis pri ĝi en kongreso, sur la retforumo. Al tio respondadis k-dino Sabatier. Ne temas pri teĥnika afero : ĝi estas problemo de la fundamenta politiko, koncernanta la Plenumkomitaton, ja la tutan SAT. La plimulto rikanas ke tion diras nur kuniklokoruloj. En pasinteco oni ĉiam same parolis pri krizo, kaj tiaj «krizoj» pasis senspure. Oni devas klopodi plimultigi la membrecon. Iu eĉ proponas ŝparon de papero kvazaŭ ĝi povus solvi la malfacilon.

Ne, tiu ĉi fojo estas diferenca. Oni devas serioze pensi pri la eventuala bankroto. Se ĝi estas neevitebla, oni devas pretigi sin por la okazo ke ĝi realiĝos. Diference estas perei sciante kaj perei senkonscie, surprizite, kio estas vere katastrofa.

Mia propono estas la jena.

Mia maĵora premiso estas ke SAT devas ne morti, devas ekzisti tiel longe kliel troviĝas la laboristaro, eĉ se ni devus ĉesi eldoni Sennaciecan Revuon, eĉ eldonante unufolian Sennaciulon ĉiun kvaronjaron. Por ne perei, oni devas ekvilibrigi la bilancon. Se la multigo de la enspezo ne estas atendebla, la sola solvo estas malmultigi elspezon.

Kontraŭ tio, ĉiuj ĥore krias ke tio estas malpozitiva sinteno, ke oni devas pensi pozitive, ke deficito en la nuntempo estas fonto de estontaj enspezoj. La vojo al bankroto estas pavimita de kadavroj de ĉiuj tiuj pozitivpensuloj. Ili diris ke investo por la estonto estas la politiko prenenda, malmultigo de elspezo estas la plej facilanima, evitinda, kiu masakras la ĝermon de kreskado. Kion faradis en la historio ĉiuj entreprenistoj kiuj revivigis sukcese bankrotontajn firmaojn? Fortranĉon de kostoj, ĉefe maldungon de laboristoj. Ne diru ke tio estas logiko de la kapitalismo. Ni vivas en kapitalismo, vole-nevole. Inter la lupoj ni devas same boji. Se ne, ni formortos.

Kiel egaligi la bilancon?


Feliĉe, la pensiiĝo de nia ĝenerala sekretario proksimume koincidas kun la antaŭvidata fino. Ni povos elteni nin ĝis tiam kiaj ni estas. Kio post tiam? Mi aŭdis ke k-do Barkoviĉ estas preta volontule labori. Sub tiu ĉi hipotezo, kun grandega danko mi sugestas tion akcepti.

Samtempe ni povus vendi aŭ luigi al SAT-Amikaro la konstruaĵon de la oficejo, en kies unu angulo ni povus sekurigi kelkajn skribtablojn kaj aparatojn. La membroj de la Plenumkomitato daŭre laboros volontule kiel nun.

La rolo de LEAoj

Tiamaniere, ni ne povos reteni la nunan organizan principon. LEAoj akiros pli grandan rolon ol ĝis nun. Ni devus transiri al strukturo simila al tiu de UEA. En lando kie ĝi ne ekzistas, ni devas organizi ĝin. Mi mem jam proponis tion al la peranto en Japanio, TANI Hiroyuki. Ĝis nun, ĝi ne estis necesa, sed mi opinias ke de nun ni bezonas ĝin. Aktualaj LEAoj supozeble ne estas deficitaj. Almenaŭ la japana estas finance solida, zorgate en la bonaj manoj de k-do Tani, regule aperigante Bultenon kvaronjaran, sen oficejo.

YAMASAKI Seikô



Rebato al la artikolo de k-do Ledon

En la revuo Sennaciulo de decembro 2001, en rubriko «El la Mondo», kamarado Ledon skribis analizon sub la titolo: «Ekkonscio pri grandaj rompoj» pri la Unua Tutmonda Forumo pri Edukado kiu okazis en urbo Porto Alegre pri kiu mi volas fari komentojn:

Kamarado Ledon konstatas la diskurson de la maldekstra Laborista Partio (Brazilo) kiu strebas por plibonigo de la eduka sistemo en Brazilo por ĉiuj. Ledon tamen aldonis ke «Dume, kiam oni skribis tiujn tre longajn kaj belajn frazojn ĝuste la publikaj edukistoj strikas jam de 70 tagoj». Ne brazila leganto, kiu ne estas bone informita pri la afero tuj pensos ke Laborista Partio nur teorie pledas por pli bona eduksistemo sed fakte ne zorgas mem pri edukado. La fakto estas ke la Laborista Partio en Brazilo ne estas la reganta partio kaj tute ne kulpas pri la strikado de federaciaj edukistoj. Laborista Partio estas tre alte taksata en kelkaj urboj kiaj Porto Alegre kie la popolo havas altan politikan konscion, inkluzive la Laborista Partio regas en Porto Alegre dum tri sinsekvaj oficperiodoj sed la reganta partio kiu kulpas pri la striko estas alia (PSDB). En aliaj urboj kiel Santo André, la urbestro (laborista Partio) jam gvidis la urbon dum tri sinsekvaj ofic-periodoj (kio pruvas ke laborista partio pli bone administras) kiam finfine li estis sovaĝe murdita la 21an de januaro 2002 en urbo São Paulo. La perforto en Brazilo estas terura.

Mi kiel anarkiisto preferus ke ne estu partioj kaj ŝtatoj sed estas milfoje pli bone (por la laboristoj) kiam la Laborista Partio administras ol kiam la dekstruloj regas.

Mi bedaŭras ke Ledon kritikas la senpagajn kaj publikajn lernejojn de Brazilo kaj defendas la privatajn, kiam oni scias, ke la Publikaj Universitatoj estas multe pli altkvalitaj ol la privataj kaj profitcelaj universitatoj.

Ledon atakas Fidel Castro-n kaj la eduk-sistemon en Kubo sed vi mem komparu la statistikojn de Brazilo kaj Kubo en tiu fako:


Kubo: analfabetoj: nur 4% de la loĝantaro. Brazilo: 14,7% estas analfabetoj.

En ĉiuj aliaj sociaj komparoj en la kampo de edukado kaj sansistemo, la situacio de Kubo estas multe pli bona ol en Brazilo.

Johano (Joao Manoel Aguilera Junior) Sat-membro

Nia asocio ricevis multajn skribajn bondezirojn okaze de la jarŝanĝo. Ne povante respondi al ĉiu aparte, La PK de SAT elkore dankas al ĉiuj kaj reciprokas la bondezirojn. Ni esperu ke la jaro 2002 estos por SAT sukcesa, ke niaj membroj faros ĉion eblan por montri ke la laborista E-movado estas necesa kaj utila.

La P.K. de SAT



75-a KONGRESO DE S.A.T.
ALICANTE (ES)
1-7.07.2002

Organiza Kongresa Komitato :
Prezidanto: Martin Bustin Benito, Apt° de Correos 4143, ES-03080 Alicante.
Tel. kaj Fakso: 00.34.965184596
Rete: <marteno@ctv.es>
Bankkonto: Martin Bustin Benito,
BBVA 0182-0102-16-0203052953.
Sekretariino : Liya Maziy (sama adreso)

Kotiztabelo en €

Kategorio	Ĝis 31.12.2001	31.03.2002	31.05.2002	Poste
SAT-membro	46,15 €	55,38 €	66,15 €	76,92 €
SAT-geedzoj	73,85 €	89,23 €	106,15 €	123,08 €
SAT-gejunuloj (15-25j)	23,08 €	27,69 €	33,08 €	38,46 €
Gasto	61,54 €	70,77 €	81,54 €	92,31 €
Gastoj-geedzoj	96,92 €	112,31 €	129,23 €	146,15 €
Gastoj-gejunuloj (15-25j)	30,77 €	36,92 €	43,85 €	50,77 €

Infanoj (ĝis 15 j) ne pagas kotizon.

- ❑ La supre menciitaj kotizoj (kategorio A) validas por la partoprenantoj el la landoj de Eŭropo ne sube menciitaj kaj el Aŭstralio, Israelio, Japanio, Kanado, Usono, Korea Respubliko, Sudafriko.
- ❑ La partoprenantoj el CZ, HU, PL, SK, SI (kategorio B) ĝuas 40% rabaton.
- ❑ La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa SU, eksa YU krom SI kaj ĉiuj afrikaj, amerikaj kaj aziaj landoj krom supre menciitaj (kategorio C) ĝuas 60% rabaton.

Kongresontoj aliĝintaj ĝis la 15a de Januaro 2002


1. SUAREZ Manuel(FR); 2. OPULSKIENE Grazina(LT); .3. HOLLINGER Maximilian(AU); 4. AROLOVIĈ Natalia(RU); .5. PRENT Arturo(GB); 6.MONTESINOS Ana(ES); 7. CASQUERO Augusto(ES); 8. BOURLOT Carlo(IT); 9 SCHRAM Jakvo(BE; 10 MAZIY Liya(ES); 11. BUSTIN Marteno(ES);12. POPA Floarea(RO); 13. CHARLOT Vincento(FR); 14. RALALARISOA Justine(MG); 15. LEGROS Andreo(FR); 16. CABEZOS Juan Antonio(ES); 17. BERNABEU José María(ES); 18. BARKOVIĈ Kreŝimir(FR); 19. FILLAT Monique(FR); 20. LAYEUX Monique(FR); 21. GRIGORIEVA Irina(ES); 22. GARCIA Angel(ES); 23. NOGUERO Lorenzo(ES); 24. SALGUERO José María(ES); 25. ARNAIZ Severiano(ES); 26 GARCIA Jesús Miguel(ES); 27. NAZAUA Etsuko(ES); 28. MARTINEZ Eduardo(ES); 29. RAPOSO Berta(ES); 30. MANAU Ramón(ES); 31. VALOR Ramona(ES); 32. SIMCOCK William H(GB); 33. WOLFGANG Gunter(DE); 34.X (DE); 35. HEINZE Bernie(AU); 36. TOUBALE Franciska(AU); 37. HARDY Roger(FR); 38. PERSSON Pelle(SE); 39 KESSOUS Djemil(FR); 40. KESSOUS Michele(FR); 41. AROLOVIĈ Amalia(RU); 42. RIGAULT André(FR); 43. RIGAULT Louisette(FR); 44. THOLLET Marc(FR); 45 THOLLET Renée(FR); 46. FUYNEL Aneline(FR); 47. GAUME Michäel(FR); 48. ĈUDOTVOROVA Ilona(UA); 49 GEĤT Grigorij(UA);

PRELEGONTOJ

Ĉiuj gekamaradoj kiuj posedas interesajn prelegojn kaj deziras prezenti ilin dum nia kongreso en Alikanto, bonvolu rapide anonci sin ĉe la O.K.K. por ke oni povu enprogramigi tiujn intervenojn. Por ke la prelego estu akceptita bonvolu mallonge prezenti ĝin al la O.K.K.

Ankaŭ ni invitas ĉiujn frakciojn kaj grupojn, kiuj deziras aparte kunveni dum la kongreso, informi la OKK-on kian ejon ili bezonas kaj kiom da tempo. Tio estas nepre necesa por enprogramigi ĉion kaj rezervi la lokojn.

PLANO POR IRO DE LA STACIDOMO DE ALIKANTO ĜIS LA KONGRESEJO (UNIVERSITATO)



Teksto sub mapo:

1. Stacidomo RENFE, kien alvenos ĉiuj kongresontoj kiuj vojaĝos per fervojo.
2. Haltejo de la aŭtobuso n° 24 kiu troviĝas 30 metrojn de la stacidomo en la Avenida de la Estacion.
3. Haltejo de la aŭtobuso n° 24 antaŭ la Kongresejo Universidad de Alicante.

La aŭtobusoj funkcias de la 6h30 matene ĝis la 22h30 vespere kaj startas de la haltejo en Avenida de la Estacion ĉiujn 7 minutojn averaĝe.
La biletoj por la aŭtobuso numero 24 kostas 0,75 € kaj ankaŭ eblas aĉeti karton en kiu la prezo estas pli malalta.

Ĉu vi ankoraŭ ne decidiĝis ? La fama familieca SAT-etoso atendas vin dum la kongreso de Alikanto. Ni serioze laboros, sed ni ankaŭ profitos de la maro kaj la suno de Alikanto. Do, plenigu la aliĝilon kaj aliĝu tuj !

ĈU LA JARCENTO DE LA VIRINO ?

1. La virino en la sociaj organizoj.

Dum jarcentoj la virino estis enfermita en medioj ekskluzive dommastrumaj kaj tio estis kontente akceptita, ĉar tio estis konsiderata kiel nature virina. De post 1850 la virino aldoniĝas al pagataj laborfortoj, ĉar eĉ se ŝi restis hejme, ŝi ĉiam partoprenis la produktadprocezon, sed ĉi tiu integrado okazas ĉefe en postenoj de malaltaj aŭ mezaj hierarkio kaj salajro. Malgraŭ tio, multaj virinoj decidis akcepti la veton kaj laŭiri la vojon de persona kaj socia disvolviĝo, altiĝante al publika, labora, komunuma, politika, akademia kaj kultura spacoj. En Venezuelo virinoj aktive partoprenas en asocioj kaj en labora medio. Elstaras ilia partopreno en la eduka sistemo, inkluzive en la universitatoj, kie ili okupas multajn mezajn kaj kelkajn altajn mastrumajn postenojn.

2. La virino mastrumanta : nova mastruma paradigmo.

La mondo perceptis la kontribuon de la virino al disvolviĝo. Hodiaŭ estas komuna la ideo ke la kunigo de la virino al la ekonomia kaj socia disvolvoj estas esenca por redukti la malriĉecon kaj por la progreso de la vivkvalito de la nacioj. Logike, kiam pli da membroj de iu socio produktas, aŭtomate kaj grave pliboniĝas la ekonomio. Pri la Virino Mastrumanta, la Monda Banko konfirmas ke, se oni apogas la bonfarton de la virino, pliboniĝas la disvolvo kaj krome ĝi diras, ke investi ĉe la edukado de la virino produktos daŭran disvolviĝon. En la lastaj jardekoj pliprofundiĝis kaj pliampleksiĝis konsciiĝo pri la intereso por la integriĝo de la virino en la socia disvolviĝo, ĉefe ekde post milito. La impulso fare de Unuiĝintaj Nacioj por la promocio de la virino kondukis al multaj esploroj kaj aktivaĵoj kiuj malfermas novajn perspektivojn al la nuntempaj problemoj.

De tie venas ke Gustavo Roosen, en sia artikolo "La jarcento de la virino" (El National, 12/01/2000) asertas ke ĉi tiu estas la jarcento de la virino kaj ke la viro havos pli grandan veton, ĉar ni devas rekonstrui landon kaj en tiu grandega tasko, la virino politika, profesia, laborista, studenta, havos rolon multe pli markitan ol nun kaj la vortoj de la nova skribenda historio estos sendube skribitaj per virina inko.

Milagros Espinoza

Tiu ĉi teksto konsistas el fragmentoj de la prelego "Ekskludo kaj partopreno en la mastrumaj kadroj de la venezuela virino" (decembro 2000) ĉe la postdiplomo de la Instituto pri Profesia Pliboniĝo de Instruantoj, dum la celebrado de la 50-a datreveno de la Instituto.

Ĝi aperis en la gazeto "Lingvo kaj internacia komunikado" (Lengua i Communication internacional) de la Asociacion Venezolana de Esperanto, n° 17, julio 2001.

Tradukis: Floreal Gabalda

S.A.T.  erinaco

DISTRA PAĜO POR SERIOZAJ SAT-ANOJ

POR JUNAJ SAT-ANOJ

KRUCVORTENIGMO

1	2	3	4	5	6		7	8	9	10
11						■	12			
13					■	14	■	15		
16				■	17		18			■
19			■	20						21
22		■	23						■	
	■	24						■		
26	27						■	28		
■	29					■	30			
31			■		■	32				
33			34	■	35					
36										

(R) Signas la radikon

Horizontale : 1. Kultura doktrino, fondita de Lanti; 11. Persono konfidanta siajn aferojn al profesia aferisto (R); 12. Ina superhoma estaĵo (R); 13. Organo en kiu evoluas la feto ĉe mamuloj; 15. Felo preparita por la homa uzado (R); 16. Bulboherbo kun brilkoloraj floroj (R); 17. Objekto por infana amuziĝo (R); 19. Prepozicio; 20. Speco de likvoro; 22. Simbolo de titano; 23. Prizorgi pluan kreskon de vegetaĵo; 24. Artikulo kaptanta insektojn per teksita reto; 25. Subjunkcio montranta rilaton inter du agoj; 26. Sciigo pri la aŭdita aŭ spertita novaĵo; 28. Malgranda karneca frukto (R); 29. Neŭtra nea pronomo; 30. Neokupita; 31. Kun tranĉa rando (R); 32. Atentigi iun pri la farota malbono (R); 33. Nefakulo (R); 35. Trakti iun kun absoluta regpovo; 36. Tre elstara figuro inter la fondintoj de SAT.

Vertikale : 1. arto pri formado de figuroj el solida materialo (R); 2. Eligi ion kun pena movo; 3. Dekoraciita juvelaĵo; 4. Daŭrfolia arbedo kun grandaj floroj (R); 5. Membro de grupo; 6. La tria kaj la 24-a literoj de la Esperanta alfabeto; 7. Sufikso por juna naskito de besto; 8. Konata metaloido (R); 9. Rilata al konata dolĉa nutraĵo; 10. Akvomaso kiu leviĝas kaj refalas ĉe la supraĵo de maro (R); 14. Vojaĝo de teatra, kantista aŭ simila trupo; 17. Prenanto de io, post pago, por ĝia uzo dum difinita tempo; 18. Precize difinita tempo de iu okazo; 20. Fari ion komprenebla (R); 21. Fari kirurgian procedon; 23. Turni la antaŭbrakon (R); 24. Publikigi per presado (R); 25. La inverso de la kosinuso (R); 27. Adverbo signifanta "tiel same"; 28. Longa bongusta berfrukto (R); 30. Karakterizanta specon de homo; 31. Irvojo en ĝardeno (R); 32. Ofte uzata numeralo; 34. Subjunkcio; 35. Nomo de la 24-a esperanta litero.

Ivan Moĉinlik